

Estrara interkonsiliĝo de NEL, 2016-12-08 je 19.30, per Skype.

*Mario Machlik, Amelie Matt, Anne Karin bondhus, Herman Raner, Ulf Lunde.
Dum punkto 3 partoprenis ankaŭ Ingebjørg Rambjør.*

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo, la 10-an de novembro

Aprobata.

2. Ekonomio

Skagen Vekst 52 474 kr (49 805 kr).

Skagen Høyrente 130 030 kr (129 977 kr).

3. Landa kunveno 2017, nova dato

Pro la tiam aranĝo "Nordsjørittet" ni ne sukcesas trovi malmultekostan tranoktadon en Sandnes dum la semajnfino la 9a de junio – 11a de junio 2017.

La estraro tial decidis movi la NEL-kongreson al la pentekosta semajnfino (2a de junio – 4a de junio), se la prezroj tiam estos akcepteblaj. Ingebjørg Rambjør kontaktis la aktualajn hotelojn (Hotel Sverre kaj Thon Hotel Sandnes) ĉi-semajne kaj kontrolis iliajn prezojn dum pentekosto. Ni esploris ankaŭ la eblecon pasigi ekzemple la vendredan vesperon en aliaejo.

4. Seminario

La 19a de novembro okazis sukcesa seminario kun preleganto-gasto S-ro Lu Wunsch-Rolshoven. Ĝin partoprenis per Skype 17 homoj el 8 lokoj en Norvegio, kaj S-ro Wunsch-Rolshoven en Germanio.

La Estraro volas sendi al li Pondus-libron donace kiel dankon pro la prelego.

5. Voĉdono pri statutŝanĝoj de UEA

La estraro decidis, ke ni respondas "jes" al ĉiuj proponitaj statutŝanĝoj. Mario Machlik sendos nian respondon al UEA.

6. Eventualaĵoj

- a) Por kontraŭbatali la malkreskon de la membraro, TEJO ĉi-jare plialtigis sian aĝlimon por junula membreco de 30 jaroj al 35 jaroj. Ĉu indas proponi al la Landa Kunveno, ke NJE faru simile?

La estraro konsilas al NJE verki proponon, pri kiu povos la Landaj Kunvenoj de NJE kaj NEL diskuti kaj voĉdoni en junio 2017.

- b) Informo: La klubo La Urso en Sarpsborg malfondiĝis la 8an de decembro 2016.

- c) Kelkaj (14) membroj ankoraŭ ne pagis sian NEL-kotizon por 2016. Ni sendu al ili rememorigon pri tio.
- d) La printilo en Esperantonia paneis. Herman Ranes konsilas aĉeti novan, nigra-blankan printilon kaj ofertas helpi pri la aĉeto kiam li vizitos la oficejon post nelonge.
- e) Ann-Louise Åkerlund en SEF invitis nin al komuna konferenco inter la sveda, norvega kaj dana asocioj. Oni volas peti financan apogon por tia skandinava kongreso, eble eĉ dum la jubilea jaro 2018. (La unua tutskandinavia Esperantokongreso okazis en 1918.)

Venonta interkonsiliĝo: la 12a de januaro 2017

La kunveno daŭris ĝis 20.48 h

Protokolis: Ulf Lunde